


ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ lokakuu ♦ oktobro ♦ 5/2003



Paula Niinikorpi ĉiĉeronas dum la Aŭtunaj Tagoj. Legu pli pri la tagoj sur paĝoj 4-6 kaj 24. (AT-fotoj: Raita Pyhälä)

Finnoj premiitaj en Belartaj konkursoj, p. 8
EAF alvokas por subteno al BKC, p. 16 ♦ Perbicikle al UK, p. 18

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitus/Redaktion/Redaktejo: ✉ eaflehti@esperanto.fi

Päätoimittajaa etsitään, yhteydenotot puheenjohtajalle (Anna Ritämäki, yhteystiedot alla)

Ĉefredaktoro serĉata, kontaktu la prezidanton (Anna Ritämäki, kontaktinformoj sube)

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki. ☎ (09) 587 6738 ✉ ilkka.santtila@esperanto.fi

Tilauhint/Prenumerationspris/Abonprezo: 15 e/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 10 e; aliaj landoj 13,50 e.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja: *Anna Ritämäki*

Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ☎ (02) 423 246 ✉ anna.ritamaki@kolumbus.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:

Eila Martin, Intiönpolku 4 as. 36, 90100 Oulu. ☎ (08) 374 697

Synnöve Mynttinen, Koskenniskantie 5 D 39, 48400 Kotka. ☎ (05) 260 1326

Jukka Noponen, Viipurinkatu 27 A 12, 00520 Helsinki. ☎ (040) 5915767 ☎ (09) 1483871 ✉ jukka.noponen@iki.fi

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (03) 348 4245 ✉ markku.saastamoinen@jippii.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet:

Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ saliko@kase.fi

Eero Rinta-Karjanmaa, Poppelikatu 11-13 A 24, 15520 Lahti. ☎ (03) 783 4448

Tuomo Grundström, Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ (050) 5180 590, (02) 822 7779 ✉ tgrundstrom@

www.lailanet.fi

Kasisto/Rahastonhoitaja: *Anna-Liisa Heikkinen*

Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Officejo/Toimisto: Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Ĉefdelegito de UEA/ UEA:n pääedustaja: *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ (09) 275 5528

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

Internet: <http://www.esperanto.fi>

Allogoj de eklerno kaj de daŭra uzo

La EAF-projekto Al kvalita komunikado, nun oficiale lanĉita dum la Aŭtunaj Tagoj en Raŭmo, celas direkti nian agadon al pli kvalita informado per pli efika eluzo de niaj fortoj. Se ĉio iros bone ni sukcesos evoluigi niajn allogojn, kunkonstrui ĉiam pli kaj pli allogan movadon.

Por la progreso de la esperantomovado evidente gravas la parolantoj de la lingvo, do ni mem, la esperantistoj. Estas klare ke ni ankaŭ estas allogiloj aŭ malallogiloj por la movado, sed ĉi-kuntekste mi pensas ĉefe pri tio ke la ekzistantaj esperantistoj estas vivantaj pruvoj pri la allogopovo de esperanto. Tial, dum la Aŭtunaj Tagoj mi petis la partoprenantojn skribi aferojn, kiuj allogis ilin eklerni esperanton kaj – ĉar ankaŭ gravas ke ni estas inter tiuj kiuj plu uzas ĝin – kiuj allogis ilin plu okupiĝi pri la lingvo.

Certe oni ne tro konkludu de 28 rapide skribitaj komentoj, sed mi pensas ke ili tamen donis interesan bildon.

Do, unue, kio nin allogis eklerni?

Pluraj skribis pri scivolemo. Esperanto estis io nekonata, eble io interesa, eble ne, sed la scivolemo kondukis al esploro: ĉu la lingvo funkcias? Iu spertis malfacilaĵojn lerni la svedan kaj germanan, kaj alia frustrigis pro la komplikeco de la angla. Kelkaj pliaj estis kaptitaj de la ideo de klare strukturita lingvo. Iu simple volis novan okupon por sia libertempo.

La ecoj de la lingvo interesis, sed ankaŭ la eblecoj portataj. Pluraj ŝatis la ideon ke per esperanto ili povus konatiĝi kun interesaj homoj kaj vojaĝi al novaj landoj. Multaj aldone menciis ian idealisman sintenon, scivolemon pri ebleco envolvigi por internacia interkompreniĝo inter homoj.

Iuj malmultaj menciis gazetarajn artikolojn, librojn aŭ kursanoncojn. Pliaj menciis konkretajn homojn, kolegon de la laborejo, amikon aŭ

sian propran patron. Iu estis allogita de geamikoj per komuna vojaĝo.

Kaj kio restigis nin?

La plej ofta mencio estis partopreno en internacia renkontiĝo kaj tiea konatiĝo kun eksterlandaj esperantistoj. Iuj ankaŭ menciis ian klaran evoluon de idealisma sinteno pro la lernado kaj ekuzo de la lingvo, la kortuŝan sorton de la Zamenhof kaj lia familio, pacamo, interna ideo ... En iuj kazoj uzado de esperanto inter familianoj aŭ enamiĝo al esperantisto instigis daŭran intereson. Evoluigo de intelekta kaj ludema sinteno ankaŭ estis menciita.

Interese estas ke la norvego Jardar Eggesbø Abrahamsen en oktobro lanĉis tre similan enketon:

”Diversaj esperantistoj havis diversajn kialojn por lerni Esperanton, kaj ni ankaŭ havas diversajn kialojn por ankoraŭ okupiĝi pri la lingvo. Kio estis via ĉefa kialo por lerni Esperanton? Ĉu estis pro ideologio/politiko aŭ simile? Ĉu ĉar vin interesis la lingvo mem? Ĉu pro amikoj, amuzo ktp.?”

Kaj kio estas nun via ĉefa kialo por ankoraŭ okupiĝi pri Esperanto?

Partoprenu en la enketo ĉe <http://www.esperanto.no/enketo/>

Vi ne vidos la rezulton. Por ne influi la enketanojn ni kaŝos la rezulton ĝis iam en decembro.”

Ni revenu al raportado pri la rezulto de tiu internacia enketo!

Bonan pluuzadon de nia lingvo deziras

via prezidantino Anna Margareta


PS. En la unua trejnseminario de *Al kvalita komunikado* en Jyväskylä 4-5 oktobro ĉeestis 22 personoj. Pli vi legos sekvanumere.

Aŭtunaj Tagoj donis impresojn pri Finnlando

Kelkfoje en Bruselo oni aŭdas, ke Finnlando estas lando de silentuloj, lagoj, malvarmo kaj forta ekonomio. Fakte tio estis mia unua impreso, kiam mi flugalvenis. El la aviadiloj mi vidis multajn belegajn lagojn. Pli proksime al Helsinko videblis la sukcesoj de la finna ekonomio. Kaj ekde la flughaveno ĝis la urbocentro per la pureco de la urbo kaj ties belaj konstruaĵoj montriĝis la riĉeco de la lando. Nokta vizito al trinkejo konvinkis min pri mia alia antaŭjuĝo: finnaj viroj – sed ne esperantistoj kaj ne virinoj – kapablas silenti kune kaj tio dum multe da tempo. Jen estis Helsinko de la filmoj, kaj nome de Aki Kaurismäki. Jen estis mia unua punkto en la ĉefurbo de la norda lando.

Vendrede, frumatene, mi vojaĝis aŭtobuse al Raŭmo, mita loko por ĉiuj esperantistoj pro la fama Manifesto. Jam al kutimiĝinta al Belgio, mi miris pri la malpleneco de la lando: "Kie estas la homoj?" mi pensis. Fakte tiun impreson mi jam havis en Helsinko dum mia nokta vizito. Ĝi estis konfirmita dum la tri horoj en kiuj la aŭtobuso preterpasis nur kelkajn urbetojn. Finno eble dirus ke estas tro da homoj en la suda parto de la lando.

Meztago en Raŭmo restis nur duonhoro antaŭ la anoncita gazetara konferenco kun lokaj ĵurnalistoj. Rapide ŝanĝiĝinte miajn vestaĵojn mi atingis la salonon kun la Loka Kongresa Komitato kaj estraranoj de EAF. La unua impreso estis la organiziteco de la finnaj esperantistoj. Bela salono, kafo, kukoj kaj serioze preparitaj informdosieroj pri Esperanto kaj la Aŭtunaj Tagoj atendis la ĵurnalistojn. La unua sukceso de la 'komunik-



Dafydd ap Fergus prelegas.

adaj' Aŭtunaj Tagoj estis gazetara konferenco en la bela hotelo kiu gastis la Tagojn. Post foto-sesio komenciĝis unuhora diskutado kun ĵurnalistoj. Aperis almenaŭ tri tre favoraj kaj sufiĉe detalaj artikoloj pri Esperanto kaj la Aŭtunaj Tagoj. Ankaŭ la radio kovris la eventon "Esperanto-Asocio de Finnlando

ne nur verkis belan laborplanon pri komunikado sed efektivigis ilin”, mi pensis.

Vendrede vespere oni ĝuis saŭnon ĉe apuda lago – aŭ ĉu vere estis la balta maro? Per granda arto la finnaj esperantistoj verŝis akvon sur la randon de varmega forno. La ĉambro tuj pleniĝis de vaporo kaj la temperaturo altiĝis kaj altiĝis. Kuŝante sur ligna benko mi provis paroleti sed ĉefe provis elteni la varmegon. Kiam estis tro ni naĝis en la malvarma akvo de la balta maro. Jen esperantista saŭno!

Sabate komencis la diskutado kaj prelegado. Antaŭe avertita mi sciis ke finnoj kutime aŭskultas la preleganton kaj ne interrompas. ”Ne timu se ili nenion diras. Tio ne signifas ke ili ne aŭskultas,” diris amiko kaj antaŭa preleganto ĉe la Aŭtunaj Tagoj. Kaj tio konfirmiĝis. Dum la ĉi-jaraj Aŭtunaj Tagoj EAF lanĉis bone strukturitan kaj elpensitan komunikadan projekton ’Al kvalita komunikado’. Mia tasko dum la Tagoj estis

ĝenerale enkonduki la temon prelegante pri la Brusela Komunikadcentro kaj konkrete detaligante la labormetodojn kaj rimedojn kiuj helpas Esperanto-asociojn agi efike pri amaskomunikiloj. Alia preleganto estis Jukka Pietiläinen kiu sperte klarigis la signifon de la Raŭma manifesto. Ĉu mi subskribu ĝin?

Sabate kaj dimanĉe estis ankaŭ tempo ĝui la pitoreskan kaj ĉarman etoson de Raŭmo, la urbo, kies malnova centro estas mondkonata kiel heredaĵo de Unesko. Alia bona ero en la programo estis memoraĵoj pri la Internacia Junulara Kongreso de 1980 en Raŭmo. Tre amuze estis vidi filmintervjuon kun ’junuloj’ el tiu IJK. Tuomo Grundström estis tiam la zorgema kunorganizanto de tiu IJK kaj fama en Esperantujo pro la tiam ofte ripetita eldiraĵo: ’Gejunuloj, tuŝu unu la aliajn, sed bonvolu, ne tuŝu la teknikaĵojn’. Grundström gvidis iamajn IJK-partoprenintojn, kiuj rakontis pri la evento.



Antaŭ la vespera programo.

Aŭtunaj Tagoj

Entute pli ol 50 homoj ĉeestis la ĉijarajn Aŭtunajn Tagojn. Per ĝi Esperanto-Asocio de Finnlando montris sian bonegan organizadon kaj perspektivon al la estonteco. Gratulojn!

Dafydd ap Fergus



Sennoma partoprenanto en la Aŭtunaj Tagoj. Supozeble li ne pagis la aliĝkotizon.

Parto de la junulkoruso kiu kantis en Urhola.



Paula Niinikorpi ĉiĉeronas.



Al lingva demokratio!

Alvoko al la esperantistaro

(kaj aparte al la membroj de UEA/TEJO/ILEI)

Karaj membroj (kaj ne-membroj),

la Komitato de UEA dum la ĵus pasinta Universala Kongreso en Gotenburgo taksis pozitivaj la atingaĵojn sur la kampo de la labor-plano dum la pasintaj jaroj kaj aprobis aktualigon de ĝi por la jaroj 2003-2005. Ni nun ree alvokas, por ke oni laboru laŭ la antaŭviditaj prioritatoj ankaŭ en la komenciĝanta labor-jaro.

La labor-plano emfazas la jenajn prioritatojn:

◆ informado ◆ instruado ◆ utiligado

kiuj estu atingataj kune kun

◆ plijuniĝo ◆ tutmondiĝo ◆ profesiiĝo.

Ili estas en si mem klaraj, kaj vi povas detale legi en la labor-plano mem, kiel ili estas komprenataj. La teksto de la laborplano estas ricevebla per mesaĝo al <uea@co.uea.org>, per letero al la kutima adreso de UEA aŭ per aliĝo al la listo <labor-plano-de-uea@yahoogroups.com>.

Dum la pasinta jaro multo estis realigata en la kampo de informado kaj papera kaj reta. La kelkaj grandaj artikoloj en internacie gravaj gazetoj, kiuj aperis en la lastaj monatoj, estis sekvataj de amaso da artikoloj en naciaj kaj lokaj gazetoj kunlige kun la kampanjo gvidata de la Brusela Komunikad-Centro okaze de la Universala Kongreso.

Samtempe ankaŭ la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, ILEI, kaj la junulara sekcio de UEA, TEJO, renovigis siajn estrarojn kaj pretas por pliaj laboroj kaj pliaj atingoj en la propraj kampoj.

La Komitato de ILEI aprobis tri agadprioritatojn: 1 – organiza plifortiĝo, 2 – instrukapabligado, 3 – la projekto Interkulturo, akorde kun la strategiaj prioritatoj de la labor-plano de UEA. Ili realiĝos tra kunlaboro kun TEJO, kiu jam okazas precipe kun ĝia laborgrupo "Esperanto@Interreto", kaj per plifortigo de kunlaboraj rilatoj kun la landaj sekcioj kaj ĉiuj agantoj en la E-instrua kampo.

Ni varme konsilas, ke en ĉiu lando kaj en ĉiu organizaĵo tra la tuta mondo estu almenaŭ unu homo, kiu respondecas pri la realigo de la labor-plano kaj aliĝas al la listo, kie ĝuste oni diskutas pri tio, per malplena mesaĝo al la adreso

<labor-plano-de-uea-subscribe@yahoogroups.com>

aŭ alimaniere kontaktos nin.

Ni emfazas, ke nia intereso estas laboro kaj kunlaboro por Esperanto. Personaj polemikoj, singravigoj kaj malgravigoj de aliaj esperantistoj neniom utilas por tiu intereso, sed ni celas ion pli gravan por ĝi: ni volas atingi pli justan rilaton inter kulturoj kaj lingvoj en la mondo, kaj ni disponas konkretan rimedon por tio. Pri tio ni laboras kaj pri tio ni invitas vin labori.

Ni faros nian komunan eblon por helpi vin labori laŭ la labor-plano kaj ni dankas vin pro viaj estontaj klopodoj.

*Renato Corsetti, prezidanto de UEA
Bertrand Hugon, prezidanto de TEJO
Radojica Petrovic', prezidanto de ILEI
Trevor Steele, ĝenerala direktoro de UEA*

Finnoj gajnis premiojn en Belartaj konkursoj

Anja Karkiainen gajnis la unuan kaj duan premion en la branĉo "poezio" de la Belartaj Konkursoj de UEA. Jukka Pietiläinen gajnis la unuan premion en la branĉo "eseo". La rezultoj estis publikigitaj en Universala Kongreso en Gotenburgo. La titoloj de la venkintaj poemoj de Anja Karkiainen estis "Ne plu" (unua premio) kaj "Plu kaj plu" (dua premio) kaj la eseo de Jukka Pietiläinen nomiĝis "La kvara periodo en la esperanta literaturo".

Anja Karkiainen estas jam pluvoja premio, speciale en la branĉo "kanto" dum Jukka Pietiläinen partoprenis la konkurson unuafoje. La rezulto signifas ke ili ne rajtas partopreni la konkurson en branĉoj en kiuj ili venkis dum venontaj tri jaroj.

La novaĵo pri la premioj aperis en pluraj gazetoj, i.a. Helsingin Sanomat lunde la 4-an de aŭgusto pere de la novaĵagentejo STT.



Anja Karkiainen kaj Jukka Pietiläinen kun siaj diplomoj. (Foto: Päivi Saarinen)

Raporto pri la rezulto de voĉdonado de Belartaj Konkursoj en la jaro 2003

Prezentita dum La Universala Kongreso En Gotenburgo 2003

Branĉo: Infanlibro de la jaro

Por la branĉo *Infanlibro de la jaro* venis ĉi jare nur unu libro, kiu konforme al la artikolo 2 punkto 1 de la regularo de Belartaj Konkursoj tamen ne povis esti prijuĝata. La artikolo tekstas: *Rajtas konkursi ĉiu esperantisto, kiu ne gajnis dum la tri tuj antaŭaj jaroj la unuan premion en la branĉo por kiu li/ŝi konkursas.* La esperantistino, kiu mem tradukis kaj eldonis la libron

gajnis la premion en la jaro pasinta.

Tiel en la branĉo infanlibro de la jaro oni prijuĝis nenium libron kaj la premio ne estis aljuĝita.

Branĉo: Kanto

En la branĉo Kanto la ĵurianoj aljuĝis:

Du egalajn duajn lokojn por jenaj kantoj:

– La unua estas kanto kun interesa titolo *less: nottisenz a cuore*; ĉar la titolo ŝajnis al mi ne pure esperanta por iom orientiĝi mi arbitre, laŭ la unuaj vortoj de la kanto nomis ĝin *Li naskiĝis*

en Irano. La kanton sendis pseŭdininimulo SIG-RAN, kies vera nomo estas Nargis Mondjazib el Usono.

– La alian egalan duan lokon ricevis kanto sub iom mistera titolo: *Maxwell: Californi a were leane*; ĉar ankaŭ tiu titolo ŝajnis al mi iom loze ligita kun la Lingvo Internacia, por iom orientiĝi mi arbitre, laŭ la unuaj vortoj de la kanto nomis ĝin *Piano dum la nokto*. La kanton sendis pseŭdininimulo SIG-RAN, kies vera nomo estas Nargis Mondjazib el Usono.

Kaj jen finfine la unua loko kaj premio An-Song-san laŭ decido de la ĵurianoj iris al la kanto sub belsona titolo *Page Wiki ams United America*. Ankaŭ tiu titolo ne diris multon al mi, tamen mi ne kuraĝis procedi kiel en la du antaŭaj kazoj ĉar la unua loko estas ja unua loko. Eble tio iel rilatas al la kongresa temo Lingvaj rajtoj. Ankaŭ tiun ĉi kanton sendis pseŭdonimulo SIG-RAN. Post malfermo de la koverto efektiviĝis, ke la vera nomo de la aŭtoro, kaj probable ankaŭ la plenumantino estas: Nargis Mondjazib el Usono.

Branĉo: Poezio

La trian premion ricevis poemo kun titolo *Tra li aero* de aŭtoro, kiu sin kaŝis sub pseŭdonimo Pirato. Post malfermo de la koverto kun vera nomo efektiviĝis, ke Pirato estas pasintjara laŭreato en branĉo kanto Christian Riviere el Francio. La premio estis aljuĝita inter la aliaj pro la ideo kaj interese faritaj kunmetitaj vortoj.

La duan lokon gajnis poemo *Plu kaj Plu* de Tina Stano, kies vera nomo estas Anja Karkiainen el Finnlando.

La unuan lokon gajnis poemo *Ne plu*, pseŭdonimo Tina Stano, vera nomo Anja Karkiainen el Finnlando.

Do la unuan kaj la duan lokon gajnis la sama finna aŭtorino pro la duobla poem-kompleto: *Plu kaj plu*, kaj *Ne plu*. La ĵurio substrekis pritakson de grava problemo etika, sen altrudiga moral-iĝemo kaj bona realigo de tradicia esprimformo.

Branĉo: Teatraĵo

La ĵurianoj aljuĝis nur du premiojn, kio tamen estas progreso kompare kun la pasinta jaro, kiam oni aljuĝis nenian premion en la branĉo teatro.

La dua premio iris al Trombo pro la teatraĵo *Ve!tero*. La vera aŭtoro estas Stefan MacGill el Hungario. Pri *Ve!tero*: Bona stilo, vigla rakonto. Pli filma ol teatra.

La unua premio iras al Vera Anonimo pro *Samhufo kaj la morto*. La Vera Anonimo reale nomiĝas Jorge Teles kaj vivas en Brazilo. Lia teatraĵo estis legita kun plezuro, la teksto kaptas la intereson, bone disvolviĝas la agoj.

Branĉo: Eseo

En la branĉo eseo la ĵurianoj aljuĝis:

– la trian premion al Seneko pro la eseo titolita *La tri doktoroj*. La vera nomo de Seneko estas Paulo Sergio Viana el Brazilo. La eseo estas sprita, elegantstila, pensiga kaj – cetere – tute aktuala por diversaj movadanoj. La eseo helpas aliri demandon kial elituloj foje forlasas Esperanton.

– la duan lokon oni aljuĝis por eseo *La pluralo* de Paulo, kies vera nomo estas Cristian Riviere el Francio. La eseo estis plezure altnivela, laŭteme bone preparita kaj lingve flua. Beletre tre bona. Tre erudicia kaj belstila, kun certa esperantologia trajto.

La unua loko kaj premio Luigi Minnaja estis aljuĝita pro la eseo *La kvara periodo en esperanta literaturo* al pseŭdonimulo Libermulo, kiu estas Jukka Pietiläinen el Finnlando. La eseon oni trovis lingve agrable lerta kaj altnivela. La aŭtoro ludas kun sia lingva talento. Tre bona analizo, bonstila.

Branĉo: Prozo

La prijuĝoj de la juĝantoj estis malsamaj jen la du ekstremaj.

... *Mi informas vin, ke mi ne trovis inter la senditaj tekstoj iujn eksterordinaraĵojn.*

la alia skribis:



Esperantoa ja Euroscolaa

EU järjestää vierailu- ja tutustumismatkoja EU:n Strasbourgin parlamenttitaloon eurooppalaisille 16-19 -vuotiaille nuorille (ns. Euroscola-tapahtuma). Enontekiön lukion hakemus matkalle jätettiin jo keväällä 2003. Euroopan parlamentin tiedotustoimisto on nyt päättänyt esittää, että Enontekiön lukio kutsutaan Strasbourgii Euroscola-kokoukseen 28.4.2004. Mutta miten näin pitkälle on päästy?

Enontekiön lukiossa on jo vuodesta 1998 voinut suorittaa Esperanton alkeet -kurssin.

Suomen Opettajien Esperantoliitto (ELFI) oli pannut asian merkille, ja ehdotti, että Enontekiön lukio jättäisi hakemuksen Euroscolaan, ja että Euroscola-ohjelman lisäksi matkaan voisi liittää esperantoa harrastavien nuorten tapaamisen Strasbourgissa. Ajatus enontekiöläisten lukio-alaisten Euroscola-matkasta oli siis kokonaan ELFIN ideoima. Lukiomme rehtori Pirjo Kontinen innostui ajatuksesta, koska esperanton alkeiskurssi on ollut meillä suosittu. ELFI lupasi auttaa tapaamisten järjestämisessä, rahoituksen hankkimisessa ja muissa käytännön asioissa.

Lukiossamme on kaikkiaan 42 oppilasta. Näistä 3 on jo suorittanut esperanton alkeiskurssin, syksyn esperantokurssilla opiskelee 6 oppilasta, ja itsenäisesti kurssin on luvannut opiskel-

la 10 oppilasta. He kaikki lähtevät Euroscola-matkalle, joten lähes puolet lukiomme oppilaista pääsee kokeilemaan esperantoa käytännössä ja tutustumaan EU:n toimintaan Stras-



bourgissa. Koska Euroscola-ryhmään mahtuu 31 opiskelijaa, liittyy ryhmäämme nuoria esperanton taitajia myös muista kouluista.

Matkaa suunniteltiin elokuun lopussa Kemiössä pidetyssä palaverissa, jolloin mm. tutustuimme matkalle myös lähteviin Belinaan ja Petteriin. Ryhmämme tulee olemaan kaksikielinen, joten esperanto sopii yhteiseksi kieleksi myös ryhmämme sisällä.

Matkamme tulee kestäämään noin viikon. Näin meille jää runsaasti aikaa yhteisiin tapaamisiin muiden maiden esperantistien kanssa. Itse Euroscola -tapahtuma kestää yhden päivän. Odotamme innolla kevättä...

Pekka Välimäki, Enontekiön lukio

▷ *Kun nur du esceptoj, la kvalito de la tuta rakontaro estis nekutime alta.*

Tamen ili per aljuĝo de puentoj decidis:

– la tria loko iras por rakonto *Aŭtobuse de Atestanto*, kies vera nomo estas Sten Johansson el Svedio.

– La dua loko pro rakonto *Go-ludo* de Atari, kiu vere nomiĝas Christian Riviere el Francio.

La unuan lokon oni aljuĝis pro prozo titolita: *La kernproblemo de doktoro Plutonio*, verkita de Okcidentobordano. La vera nomo de Okcidentobordano estas Martin Weichert el Svedio.

Branĉo: Vidbendo

Oni aljuĝis:

– la honoran mencion al Odesa Junulara Esperanto Klubo Verdaĵo pro filmo *Perlo de ?enigramarujo*.

La unuan premion ricevas Ralf Kuse pro vidbendo: *Esperanto en Maklenburgio-Antaŭpomerio*.

*Georgo Handzlik
Sekretario de Belartaj Konkursoj*

Kursoj en Esperanto-Domo Grésillon

De la fino de junio preskaŭ ĝis la fino de aŭgusto okazis unusemajnaj kursoj en la franca Esperanto-domo Grezijono, kutime dividitaj en tri nivelojn. La plej konstantaj instruistoj estis gepoloj Przemek Grzybowski (34), kiu havas 15-jaran sperton pri grezijonaj somerkursoj, kaj juna Ania Rokowszka, spertulino pri Grezijono de 5 jaroj. Ŝia specialaĵo estas ludoj kaj gruplaboroj. Vintre s-ro Grzybowski instruas pole en universitata pedagogia fakoj kaj kreas humorajn prelegetojn por pola radio en Bydgoszcz, ekzemple pri la strangaĵoj de la mondo, dum s-ino Rokowszka studas psikologion.

La aliaj instruistoj en Grezijono estis el diversaj landoj, same la 20-35 studentoj (averaĝa ĉiusemajna nombro). Kompreneble majoritatis la francoj. Dum unu semajno instruis ankaŭ R. Pyhälä el Finnlando. En ŝia grupo estis uzata la lernolibro Kunvojaĝu de P. Gubbins kaj multaj aldonaĵoj: kantoj, gramatikaj ekzercoj, bildoj kiel bazo por paroligado. Komencantoj, neniu el ili vera unuafojulo, kaj progresantoj studis

samgrupe, ĉar entute ili nombris nur 4-6. Iuj grupanoj deziris sporade helpi en la kuirejo aŭ akvumi florbedojn – estis tre varme kaj seke – iuj decidis ripozi aŭ ekskursi. Tial la programo devis esti fleksebla. Al la alia grupeto, kiu konsistis el instruantoj kaj -istoj, s-ro Grzybowski prelegis pri praktika pedagogio. La instruhoroj kutime okazis inter 9.30-12 kaj 16-18, aŭ 17-18.30, la distra vespera programo komenciĝis je la 21a horo.

Kvankam Grezijono estas kastelo, la lernoĉambroj estas ne luksaj. Troveblas tamen modernaj instruiloj, kiaj videoaparato, televidilo, magnetofonoj, diskofono. Oni povas uzi Grezijonon ankaŭ kiel bazon por ekskursoj, se oni venas per propra aŭto aŭ biciklo aŭ luprenas veturilon. La plej proksima urbo Baugé (boĵe) situas je distanco de 2 km.

Al Grésillon kelkfoje venas ne-esperantistaj grupoj por konatiĝi kun la patrolanda heredaĵo aŭ kun Esperanto. La ĉirkaŭaĵo estas kvieta, arbara, kampara. En malnova franca lingvo la nomo



Esperanto-Domo Grésillon. (Fotoj R. Pyhälä)



Dum muzika paŭzo en la Salono de Kastelo Grésillon: P. Grzybowski, M. Pyhälä kaj A. Rokowska.

gajn ŝuojn por arbaraj promenadoj. Ankaŭ poŝtelefono utilus. Ne timu la longan senkafan posttagmezon. En la trinkejo oni povas provizi sin per kafo, teo kaj aliaj refreŝigaĵoj, amike babilante kun la vendantoj (ĉifoje la gepoloj)

▷ de la kastelo signifis “kanto de akridoj”. La somernoktoj tie estas tute nigraj kaj, se la ĉielo estas sennuba, oni povas ĝui stelrigardadon, ĉar ne malhelpas lumpolucio. La vera etoso de la loko varias, laŭ la homoj, kiuj ĉeestas. Se vi decidus tien iri, prenu kun vi poŝlampon kaj taŭ-

aŭ kun aliaj kursanoj.

R. Pyhälä

<http://grezijono.kastelo.free.fr>

Adreso: Kultura Esperanto-Domo, Grésillon, F-49150 Baugé, Francio

ILEI-konferenco

Tuj post la UK en Gotenburgo, la 2-7an de aŭgusto, okazis la konferenco de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj en Höganäs en la tre taŭga kursejo Örestrand kun belega situo ĉe la maro.

La reprezentantoj de ELFI estis Carola Antskog kaj Sylvia Hämäläinen. Partoprenis 58 personoj el 22 landoj.

Tie estis elektita nova 7-persona estraro: prezidanto Radojica Petroviĉ, vicprezidanto Stefan MacGill, sekretario Atilio Orellana Rojas, kasis-to Boo Mee Kim-Lindblom, Mauro La Torre, Aleksandr Blinov, Hokan Lundberg.

La membrokotizo al ILEI kaj la abonprezo de Juna Amiko altiĝis.

La estraro kaj komitato diligente laboris en siaj kunsidoj traktante multege da problemoj. Samtempe okazis trejnseminario por 10 estontaj

grupgvidantoj kaj helpantoj en la projekto Interkulturo. Tio estas lernado de kulturoj pere de Esperanto, celita al klasoj aŭ grup(et)oj ekster lernejo uzante interreton.

Dum la konferenco oni povis konstati, ke la uzo de interreto estas tre grava afero en la nuntempa vivo. Por lerni, uzi aŭ instrui la internacian lingvon oni trovas multe da helpo en pluraj paĝaroj.

Krome ni ankaŭ aŭskultis interesajn prelegojn, ekz. tiun de vicprezidanto de UEA Humphrey Tonkin. Okazis tuttaga ekskurso ĉirkaŭ Sundo, do ni faris viziton eksterlanden al Danio. La tutan konferencan tempon regis bela, varma somera vetero kun iom mildiga vento el la maro.

Sylvia Hämäläinen


ELFI petas ke la membroj jam nun pagu la membrokotizon por la jaro 2004. Ĝi estas nun 22 e, sed certe altiĝos post la jarkunsido.

Roman Dobrzynski: “La Zamenhof-strato”

Tuj post la 88-a Universala Kongreso de Esperanto en Gotenburgo privata kuriero, mia samklubanino Leena Tiusanen enmanigis al mi en la flughaveno de Turku tute freŝan furorlibron sub la titolo “La Zamenhof-strato” de Roman Dobrzynski. Jam anticipe mi eksciis interesajn informojn pri la menciita verko dum la elsendoj de Pola Radio. En aŭtobuso survoje el la aerodromo al la urbocentro mi komencis foliumi la novan trezoron. Bela ekstera aspekto, fortika bindaĵo kaj flua stilo kaptis min kaj mia febro por starti legadon ege kreskis. La unua rigardo katenis min senaverte kaj mi estis konkerita. Sango en miaj vejnoj ekfluis pli varme kaj pli rapide ol kutime. Entuziasmo videble kreskis.

La libro estas konstruita sur interparoloj de du viroj – verkisto Roman Dobrzynski kaj d-ro L.C. Zaleski-Zamenhof, la Nepo de la kreinto de Esperanto. Al mi tre plaĉas tiu ĉi maniero trakti aferojn. Ŝajnas klare, ke ĝi faciligas la legadon. Kompreneble ankaŭ la flua stilo efikas tiu-direkte. Vera surprizo estis ekscii pri multaj, tute novaj aferoj koncerne la fazojn kaj spertojn de la Zamenhofa familio. Detala indekso, multnombraj notoj pri fontoj kaj riĉa listo literatura servas legantojn. Spontane sentiĝis dankemo pro tio, ke ni nun havas neforgeseblan, valoran materialon libroforme je ĉies dispono laŭdezire. La laboro surpaperigi ĉion estis vere giganta kaj postulis multajn jarojn. Forta persistemo estis nepre necesa. La situacio ja estis malfacila, ĉar la ĉefroluloj loĝis en Varsovio kaj en Parizo. Tamen ili atingis la celon en gloro kiel diras iu poeto. Kaj redaktoro Dobrzynski kaj d-ro Zaleski-Zamenhof meritas tutkoran gratulon.

La libro havas entute 288 paĝojn kaj ĝi estas presita somere 2003 en la litova urbo Kaunas. Varman manpremon ni ŝuldas ankaŭ al la respondeculoj en la eldonejo Ryto Varpas pro rapide, sed tamen diligente plenumita faka laboro tiel, ke al la kongresanoj malfermiĝis ebleco havigi al si freŝbakitan produkton en Svedio.



Jorma Ahomäki estis je la unua rigardo katenita de La Zamenhof-strato.

El abundaj kortuŝaj detaloj eblas mencii ĉi tie nur unu ekzemplon. ”Umschlagplatz” en Varsovio estis loko, el kiu foriris trajnoj al la ekstermejo Treblinka – ĉiutage miloj da homoj, ekstreme elĉerpitaj, malsanaj kaj malsataj. Mankis eĉ akvo. En tiuj kondiĉoj homoj amase mortadis. La kadavroj estis tuj fortransportataj al proksima juda tombejo ĉe la strato Okopowa. Oni uzis por tiu celo specialajn ĉarojn. Sur tiuspeca ĉaro la Nepo revenis el la infero...neatendite aliris lin d-ro Jan Frenkler. Li estis amiko de la Zamenhofa familio. Subite li puŝis la Nepon sur la preterveturantan ĉaron kun kadavroj. En la juda tombejo la tuta ŝarĝo estis lasita teren kune kun la Nepo kaj neniu rimarkis, kiam li leviĝis kaj foriris.

La lasta ĉapitro en la verko nomiĝas ”La Ponto”. En ĝiaj kadroj la aŭtoro duopo dialogas tuŝante larĝajn perspektivojn pri la mondlingva situacio kaj pri ĝia evoluo ĝenerale. Talentaj ▷

Sonbildoj ĉe sveda lago

La sonoj de naĝado kaj akvoludoj ŝvebis ĉiutage super la lago. Poste, krioj el arbaro: “Mi trovis jam kvin!” Eĥo: “Eĉ unu suĉ-bombonon mi ne trovis... kie.. ha jen unu!”. Internacia Futbala Matĉo kun komentario: “Florian plusendas la pilkon al Tomoya, tiu lerte preterpasas du atakantojn, Gretel klopodas haltigi lin, sed ŝoto al golo... Kristine haltigas tion per forta piedbato – tute ĝis la alia golo!”

Jen sonbildoj de la 35a Internacia Infana Kongreseto okazinta fine de julio en Lerum, 20 km de Gotenburgo. Ĝi arigis 27 infanojn el ok landoj (Belgio, Francio, Hungario, Japanio, Kubo, Norvegio, Rumanio kaj Svedio), la pli-

multo knabinoj. Preskaŭ duono venis el E-familioj kun bona lingvoscio; tamen kelkaj havis malpli da kapablo ol la kongreseto bezonas; tiuj ekspediĝis ĉiutage al paroliga kurseto.

Kelkaj gepatroj kaj aliaj familioj kun infanoj aldoniĝis al nia ekskurso al bestoĝardeno en Borås. Alitage, gepatroj, ĵurnalisto kaj interesitoj vizitis la IIK-egon kaj la infanoj pretigis koncerteton por ili.

Inter la IIK-programeroj estis pentrado, desegnado, kolĉena farado, sportaj olimpikoj kun premioj, apudlaga fajro, du trezor-serĉoj, muzikado, dancado, seĝo-ludoj kaj la ĉiunokta endormiga rakonto, per kiu infanoj aŭskultis tutan libron: “Avinjo”.

Vizitu la IIK-hejmpaĝon por legi raportojn kiujn la infanoj verkis kaj vidi fotojn. En la hejmpaĝaro de UEA serĉu sub ‘Kongresoj’. Ni kore dankas al Aino, nia surloka gvidanto, kaj al la aliaj gvidantoj kaj helpantoj.

Stefan MacGill

Komuna foto kun 28 partoprenintoj de IIK 2003.

(<http://bertosch.free.fr/iik2003fotoj/>)



▷ spertuloj konas la terenon, sur kiu ili moviĝas. Unufoja legado ne sufiĉas, necesas plurfoje reveni al detaloj. Faciligas la ripetadon la struktura bazo utiligata en la libro, kiun oni povas sur kiu ajn paĝo malfermi kaj sukcese tuj reenprofundiĝi en la problemojn. Ordinara leganto kiel mi ne kapablas profesiece prezenti kaj recenzi la

enhavon, sed unu afero estas tute klara: indas legi kaj relegi la kreaĵon de la pola-franca duopo, kiu riĉigos ĉiujn uzantojn de la Internacia Lingvo Esperanto. Jen estas por vi taŭga, inda kunulo por aŭtunaj vesperoj ĉe legolampo en komforta fotelo.

Jorma Ahomäki

Estraro kunvenis

La estraro kunvenis en la oficejo la 23an de aŭgusto 2003 je 11.20-15.30. Ĉeestis Anna Ritamäki, Tiina Oittinen, Päivi Saarinen, Synnöve Mynttinen, Markku Saastamoinen kaj la vic-estraranoj Tuomo Grundström kaj Eero Rintakarjanmaa, la kasisto Anna-Liisa Heikkinen kaj la nova prizorganto de la membroregistro Taneli Huuskonen.

La estraro pritraktis la finanĉan raporton por la unua duono de la jaro.

Por la kurso en Valamo kostoj de EAF estas la flugbileto de la ĉefinstruisto kaj donaco de la nova PIV al la instituto. La popola instituto de Valamo kovris la vojaĝkostojn de ambaŭ instruistoj ene de Finnlando. Tiina Oittinen ne ricevis salajron sed senpagan restadon dum la kursosemajno.

La edukministerio pagis subvencion de 1000 eŭroj por Esperantolehti. Limdato por nova peto por 2005 estas fino de februaro 2004, por klarigo pri la uzo de la mono la fino de aprilo 2004.

La estraro fiksis la jarkotizojn de Esperantolehti 2004 sekve (samaj kiel ĉi-jare): abonprezo 15,00 e, abonprezo por membroj 10,00 e, abonprezo por memrosocietoj abonantaj al ĉiuj siaj membroj 9,25 e, abonprezo por ordinara FEJO-membroj tra FEJO 7,60 e. La aparta abonprezo por Baltio estis nuligita.

La sekretario partoprenis kiel observanto la kunsidon de la EEU-komitato dum la UK en Gotenburgo. EAF:n reprezentis Carola Antskog. Membrokotizo de Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) por la jaro 2004 estos 0,50 e/membro. Dum la kongreso EAF kaj EEU venis al interkonsento pri la kotizpagoj de la antaŭaj jaroj.

EEU kolektas monon por la Brusela Komunikadcentro. EAF subtenas la alvokon. La estraro rajtigis la prezidanton kaj la kasiston prepari taŭgan vortumon ĝis la AT.

Dum la pasinta jarkunveno estis anoncita bezono pri kotizaltigo por 2004. Sekve la estraro decidis jam ĉi-kunsido proponi la jarkotizojn por

2004:

Individuaj membroj: 18,00 e

Membroj de Societo Nino Runeberg: 36,00 e

Aligitaj membroj de memrosocietoj: 3,00 e

Aligitaj membroj de FEJO kaj Steleto: 1,50 e

Tio signifas altigon po 0,50 e por aligita membro. Pri la ceteraj kotizoj ne estas proponata ŝanĝo.

La estraro pritraktis la preparojn por Aŭtunaj Tagoj en Raŭmo. La temo estas lanĉo de la projekto *Al kvalita komunikado*. Kostojn de la eksterlanda preleganto kovras la projekto.

La projekta grupo de Al kvalita komunikado kunvenis 24.5.2003 en Raŭmo kaj 1.8.2003 en Gotenburgo. Post la estrarkunsido la estraranoj estis invititaj al vespermanĝo kadre de la projekto. Sekva projekta kunsido estis planita por vendredo antaŭ la AT en Raŭmo, samtage kiel gazetara konferenco.

Projekta trejnseminario en la Kristillinen opisto de Jyväskylä 4.-5.10.2003: La prezidanto kaj la sekretario ricevis la taskon sendi invitletoj al ĉiuj esperantogrupoj en Finnlando, al la EAF-kaj FEJO-estraroj, EAF-kasisto kaj UEA-representanto. Ankaŭ individuaj esperantistoj, kiuj interesiĝas pri la temo povas partopreni. La prezidanto kontaktis la asocion Opintotoiminnan keskusliitto, kies reprezentanto estas invitita prelegi dum la seminario. La partoprenantoj havu eblecon libervole surloke subteni la Junularan Fonduson.

La konata rusa bardo Mikaelo Bronŝtein planas turneon en nordaj landoj post la jubilea, novjara IF en Kiel. La sekretario provizore invitis lin viziti ankaŭ Finnlandon kaj kontaktos finlandajn esperantogrupojn por aranĝi lian viziton januare 2004.

La ĉi-jara kurso en Valamo realiĝis kun 9 gelnantoj. La kursosemajno estos venontjare 4.-9.7.2004. Atilio Orellana Rojas povos denove instrui. Finnlandaj instruistoj estos 2 aŭ 3 dependante de la nombro de la partoprenantoj.

La estraro pritraktis kelkajn sciigojn kaj leterojn kaj konstatis interalie ke la nova leĝo pri ret- ▷

Esperanto-Asocio de Finnlando alvokas por subteno al la Brusela Komunikadcentro

Esperanto-Asocio de Finnlando subtenas la kampanjon startitan dum la Universala Kongreso por daŭrigo de la Brusela Komunikadcentro (BKC). Vian kontribuon vi povos ĝiri pere de la konto de EAF. (Pliaj informoj sube.)

En letero titolita **“Veto je la pluvivo de BKC en 2004”** Seán Ó Riain kaj Renato Corsetti, prezidantoj de Eŭropa Esperanto-Unio kaj Universala Esperanto-Asocio, konstatas ke **“la pluvivo de Brusela Komunikadcentro en 2004 estas necesa por la asistado al kaj vigligado de la Landaj Asocioj en sia informado pri egalrajteca traktado de la lingvoj en Eŭropo kaj pri Esperanto”**.

Zamenhof en 1887 petis la legantojn promesi, ke ili eklernos la internacian lingvon, kiam 10.000.000 aliaj personoj estos farintaj la saman promeson: **“Same en 2003 Eŭropa Esperanto-Unio petas vin promesi unufojan donacon de almenaŭ ½ % de via jara enspezo por Brusela Komunikadcentro, kiam la totalo de tiuj donacoj ebligis la pluekzistadon de BKC en 2004.”**

La kasisto de EEU taksas ke la pluekzisto de BKC estos garantiita, se 250 personoj faros tiun promeson. Dum la UK 11 samideanoj jam aliĝis al la kampanjo kaj pliaj plenigitaj promes-slipoj alvenadas ĉiusemajne. Komence de septembro la promesita sumo estis 16 000 e. La bezonata

sumo laŭ iuj taksoj estos ĉ. 50 000 e. EEU daŭre esploras ankaŭ aliajn fontojn de enspezoj, ekzemple partan financadon per projektaj subvencioj kaj per vendo de servoj.

La fondon de BKC antaŭ du jaroj ebligis la financa garantio de Universala Esperanto-Asocio. La proponon en 2001 prezentis Gregoire Martens al la UEA-komitato, kiu petis la estraron pozitive rilati al ĝi. Dungita estis **Dafydd ap Fergus**, formale de Flandra Esperanto-Ligo, sed praktike per la mono de UEA, EEU, landaj asocioj kaj privataj donacoj. Dank al donaco eblis poste ankaŭ la aldono de plia laborforto, BKC-volontulo/staĝanto **Marko Naoki Lins**.

BKC tenas daŭrajn kontaktojn kun la amaskomunikiloj kaj nutras rilatojn ankaŭ kun aliaj eŭropaj agantoj: oficistoj, sciencistoj kaj politikistoj. BKC ankaŭ kunordigas esperantistajn iniciatojn pri informado kaj pri eŭropa lingvopolitiko. Grava rezulto de tiu laboro estas la daŭre evoluanta **EEU-informejo** www.lingvo.org kun prilingvaj EU-dokumentoj, informiloj kaj artikoloj pri Esperanto. Sukcesa agado kunordigita de BKC subtene al UEA estis la tutmonda gazetara kampanjo antaŭ UK.

Bv. pagi la sumon al EAF **antaŭ la 30a de novembro 2003**. Pagoj povas esti akceptitaj ankaŭ post tiu dato. Se vi preferas pagi rekte pere

▷ aj adresoj (uusi verkkotunnuslaki) kun ekvalido 1.9.2003 preskribas ke ankaŭ malnovaj domennomoj devas esti reregistritaj. Päivi Saarinen ricevis la taskon prizorgi ke esperanto.fi estu reregistrita. La registro validos ĝis 1.9.2006.

Ĉindevena EKH-membro Wan Faguan pretas aranĝi komunan vojaĝon al venontjara UK en Pekino.

Sekvaj kunsidoj: dum la trejseminario 4.-5.10.2004 kaj en la oficejo 15.11.2003.

La raporton kompilis la prezidanto.

Notu bone membrosocietoj!

La estraro proponas ke la jarkunveno akceptu altigon de la membrokotizo 2004 de 2,50 e ĝis 3,00 e por aligita membro (por la membroj de membrosocietoj). Por membroj de FEJO kaj Steleto la estraro proponas kotizon de 1,50 e.

de UEA aŭ alimaniere vi estas petata kontakti la kasiston de EEU por interkonsenti.

La unuan slipon bv. sendi papere aŭ rete al **Johan Derks**, Rietgors 40, 8271 GH IJsselmuiden, Nederlando, *derks.esp@tiscali.nl*

La duan slipon bv. sendi papere aŭ rete al

Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, *eafkasisto@esperanto.fi*

Antaŭdankon pro via interesiĝo!

Anna Margareta Ritamäki
Prezidanto de EAF

Memoriga linio: (sumon) antaŭ la 30a de novembro 2003 al EAF, Sampo 800017-230825, indiko: mono de paginto, BKC

SENDU LA JENAN SLIPON AL LA EEU-KASISTO JOHAN DERKS:

Johan Derks, Rietgors 40, 8271 GH IJsselmuiden, Nederlando, *derks.esp@tiscali.nl*

La subskribinto, (nomo)

adreso:

lando: (retadreso:))

pagos antaŭ 30a de novembro 2003 la sumon de al Esperanto-Asocio de Finnlando.

Tiu sumo estas egala aŭ pli ol 0,5 % de mia jara enspezo.

Se BKC ne pluvivos dum 2004, tiu sumo estos repagita en 2003 aŭ donacita al alia celo laŭ mia indiko sendita al EAF. Se ja pluvivos, mi kiel dankodonacon povas ricevi **abonon de La Ondo de Esperanto 2004.**

Se mi deziras la abonon mi metas ĉi tie krucon: []

(Se vi jam abonas la gazeton, vi rajtas proponi abonon de alia esperanto-revuo.)

Dato: Loko: Subskribo:

SENDU LA JENAN SLIPON AL LA EAF:

Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, *eafkasisto@esperanto.fi*

La subskribinto, (nomo)

adreso:

lando: (retadreso:))

pagos antaŭ 30a de novembro 2003 la sumon de eŭrojn al Esperanto-Asocio de Finnlando (kontonumero Sampo 800017-230825, indiko: nomo de paginto, BCK) kaj 2 e por administraj kostoj, sume eŭrojn.

Se BKC ne pluvivos dum 2004 mi elektas la jenan alternativan uzon de mia donaco:

Donaco por fondaĵo Eŭropo ĉe UEA []

Donaco al TEJO cele al dungo de TEJO-oficisto en la CO []

Donaco al la Junulara Fonduso de EAF kaj FEJO []

Repagon de la sumo al mia bankkontonumero []

Dato: Loko: Subskribo:

Post duonmiliono da pedaltretoj

Le survoje inter Tallinn kaj Tartu min trafis dubo, ke mi eble prenis iom tro frenezan taskon, bicikli unue al BET en Tartu kaj de tie al IJK en Lesjöfors kaj UK en Göteborg. Sed min akompanis amuzaj memoroj pri antaŭaj BET-oj kaj la intereso pri vojo, kiun mi antaŭe ne biciklis. Kaj antaŭ ol mi povis konkludi, ĉu la danĝereco de la veturmanieroj de la estonaj kamionoj estas rekte aŭ inverse proporcia kun larĝeco de la vojo, min jam bonvenigis la urblimo de Tartu. En gimnazio de Miina Härma min do bonvenigis kelkaj dekoj da esperantistoj, kiuj ĉiuj ŝajnis jam anticipi koni min kaj atendi min sciinte, ke mi venus per biciklo.

Post ke mi ĝis laciĝo rakontis pri kiel mi biciklis tien kaj kiel mi planis bicikli plu, mi daŭrigis veturon al post-BET, kiu estis tritaga tendumado kun grupo de kelkaj estonoj. La loza pro-

gramo de post-BET enhavis muzikadon, promenadon kaj saŭnadon. La loza programo survoje inter Tartu kaj Lesjöfors enhavis daŭran subĉielan saŭnadon. Krom sufiĉa varmo la ĉielo ne forgesis doni kelkfoje ankaŭ abundan duŝon.

En ŝipo inter Estonio kaj Svedio mi havis plezuron diskuti kun sveda samĉambrano, kiu sciis ion pri Esperanto kaj laŭdis belecon de Turku. Li ne parolis Esperanton, sed sciis ion pri ĝi. Kaj memoris de Turku lokon, kiu nomas Ruisalo.

Ne nur ĉiuj aranĝoj estis interesaj, sed ankaŭ cirkonstancoj ne malhelpis mian veturon. Ĉi foje oni ne ŝtelis mian biciklon, ankaŭ mi devis frustriĝi nek pro malsukcesa transporto de biciklo en publikaj transportiloj, nek pro malsukcesa serĉado de bicikloluejoj. La gumoj de la biciklo rompiĝis tolereble malofte kaj mi estis neniam



Mikko, Amato, Rikardo kaj Daithi formis biciklan karavanon inter Lesjöfors kaj Göteborg.

***Mikko tuj post alveno
per biciklo al Göteborg.***
(Foto: Päivi Saarinen)

atakita, nur minacita, de grandaj koleraj hundoj. Maltrafo de vojo preskaŭ ne okazis, krom en Stockholm, kiu ja estas multe tro granda urbo por esti flue transbicilebla. Kaj se daŭra varmego iam sentiĝis esti troa, tiu alternativo tamen estas pli bona ol daŭra pluvego. Ĉar eĉ direkto de ventoj estis plejparte favora, la veturado estis preskaŭ tro facila. Ĉio tio signifis praktike la unuan fojon, ke mi faris plene sukcesan eksterlandan biciklan vojaĝon. Multjara trejnado iom post iom donas rezulton.

Post la ŝvitaj semajnoj tra Estonio kaj Svedio mi do povis konstati, ke la vojaĝo estis ne tro freneza, sed precize komferte freneza. Kaj baldaŭ post veno hejmen mi troviĝis ĉe mapo de Rusio mezurante distancojn kaj kalkulante daŭrojn. Venontjara IJK ja estos en Kovrov, 200



kilometroj oriente de Moskva. Mi bonvenigas bicikloaventuremajn esperantistojn akompani. Alternativo, en kazo ke racio venkas, estas Pollando kaj Litovio. BEMI (Bicikla Esperantista Movado Internacia) komencis en Lesjöfors plani por la venonta jaro biciklan karavanon el Pollando tra Bialystok al BET, kiu estos en Litovio.

Mikko Mäkitalo



Oni ne obeu ĉiujn logajn petojn ĉe la vojo.

FEJO ludis kaj dancis en Kimito

Naŭ FEJO-anoj havis amuzan semajnfino en Kimito 29.-31.8. Sabate tie kun FEJO-anoj estis Mazi-kursanoj, kiuj prepariĝis por printempa Euroscola-vojaĝo kun Carola Antskog kaj Pekka Välimäki.

Homoj alvenis jam vendrede vespere. Ni amuziĝis per ludoj kaj estis ankaŭ tiel klara vetero, ke ni povis rigardi la ĉielon kaj stelojn. Ni vidis ankaŭ Marson.

Sabato estis grava tago por FEJO. Tiam ni ludis piedpilkon kontraŭ loka amatorina teamo Trim. La FEJO-anoj esperis, ke la prezidanto de EAF ludus en nia teamo, sed bedaŭrinde ŝi elektis fortigi la kontraŭan teamon. La ludo enhavis du raŭndojn, ambaŭ 20 minutoj. FEJO-anoj konstruis multajn bonajn situaciojn, sed malgraŭ bonaj ŝotoj ne sukcesis fari golojn. FEJO havis en golo stelulon el Germanio, kiu forte batalis kaj blokis tre multajn situaciojn, el kiuj la kontraŭa teamo jam ŝajnis certe fari golon. Trim tamen havis iom pli bonan fortunon en golfarado kaj venkis 12-0.

Posttagmeze estraro de FEJO kunsidis kaj dis-

kutis pri aktivadoj por aŭtuno. Ni ankaŭ ludis kun Mazi-kursanoj interesan ludon nome “Läiskis”. En tiu oni sidas en rondo kaj unu staras en la mezo. La sidantoj diras nomon de iu alia sidanto kaj staranto provas tuŝi la homon, kies nomo estis dirata antaŭ ol tiu diras sekvan nomon.

En vespero FEJO-anoj kantis esperantajn kantojn kaj aŭskultis eksterordinarajn diskojn. Ni ankaŭ partoprenis Nokton de pratempaj fajroj – eventon en Västanfjärd, najbara komunumo de Kimito. En insularaj komunumoj oni bruligas festfajrojn, ”pratempajn fajrojn” (muinaistulet/forneldarna) en la lasta sabato de aŭgusto por festi la finon de somera tempo. En Västanfjärd estis balo ĉe la fajro kaj maro. Loka bando Playboys ludis bone kaj ni dancis multe. Etoso estis agrabla kaj libera, sed malgraŭ tio neniam romancoj estiĝis...

Dimanĉe kelkaj dormis longe kaj kelkaj vekigis frue por ĝui freŝan matenon per promenado. Ni ankoraŭ diskutis pri diversaj aferoj kaj post lunĉo ekveturis hejmen. Do, tre bona semajnfino!

Paula Niinikorpi

Eventokalendaro de EAF

2003

- 1-2.11 FEJO-semajnfino en Helsinko
- 30.11 Limdato por partopreni la alvokon de Eŭropa Esperanto-Unio

2004

- 13-14.3.2004 Vintraj Tagoj en Jyväskylä kristillinen opisto (aliĝilo sekvanumere, ilmoittautumislomake ensi numerossa)
- 4-9.7.2004 Kursoj en Valamo (Valamon kansanopisto)

10-17.7.2004 IJK apud Kovrov, Ruslando (TEJO)

24.-31.7.2004 UK en Pekino, Ĉinio (UEA)
septembro Aŭtunaj Tagoj (ekis kontaktoj kun svedaj esperantistoj pri okazigo de AT kiel ekskurso al Esperantodomo en Lesjöfors)

2005

februaro/marto VT (eble en Iisalmi)
somero 25-jara jubileo de la IJK en Raŭmo (ideo por internacia evento) 23-30.7.2005 UK en Vilniuso, Litovio (UEA)

Al Svedio

Post mia vojaĝo al IJF en Italio, mi pripensis ŝpari monon. Kial? Ĉar mi volis vojaĝi al Svedio... Al IJK.

Multaj homoj en IJF diris al mi ke ili vojaĝos al Svedio, al IJK kaj demandis: "Ĉu vi iros al IJK, al Svedio? Tio estas proksime al Finnlando." Kaj nun mi scias ke mi havas sufiĉe da monon por tio. Jes, unue per la ŝipo el Helsinko al Stokholmo. Sed post tio? Iu rakontis al mi, ke aŭtobuso estas pli malmultekosta ol trajno en Svedio. Hmm...

Nun mi iras... Per aŭtobuso el Porvoo al Helsinko, kaj post tio per ŝipo el Helsinko al Stokholmo. Mi havas bileton al ŝipo, sed mi ne havas kajuton. Kie mi dormos? Nenie! Mi ne dormos dum la nokto. Venos longa nokto, negravas.

Finfine, mi estas en la ŝipo. Kion mi vidas... Homo el haveno... Bubo de Harley Deividson. Kaj nun, li volas min al li, kial? Eble mi iras al la sama tablo.

– *Saluton! Ĉu vi memoras min? Ni vidis en haveno.*

– *Jes, vi sidis kun via virino en sama ĉambro, ĉu ne?*

– *Jes. Sidu kaj babilu kun mi. Ĉu vi volas trinki kun mi?*

Hmm, mi uzas malmulte brandon ĉitempe. Kion mi faros? Mi ne volas problemojn. Sed, eble unu, ne multe. Nur tiokaze ke li aĉetos tion.

– *Eble unu? Mi ofertas tion.*

– *Bonega. Sed nur unu.*

– *Ĉi tie estas kvindek eŭroj. Iru kaj aĉetu du "Jäger-maister".*

Tio estas forta kaj malbongusta trinkaĵo...

– *Ĉi tie estas la trinkaĵoj kaj ĉi tie estas restanta mono.*

– *Ĉu vi prenis salajron por ke vi vizitis servictablon, promenis kaj kunportis niajn trinkaĵojn.*

– *NE, tute ne. Ĉi tie estas via mono kaj ĉi tie estas la trinkaĵoj.*

– *HO, vi bezonas iom da salajron. Ĉi tie, dudek eurojn.*

Ni babilis. Sed mi provis estis neŭtra kaj neŭtrala.

Ĉar li havis iom da malkonkordojn kun lia virino.

– *Bonan vojaĝon, al vi knabo.*

– *Dankon kaj sama al vi ... Sinjoro, sinjoro, vi forgesis moneron de du eŭrojn!*

– *NEGRAVAS!*

Hmm, dudekdu eŭroj kaj unu malbongusta trinkaĵo... Ne, malbona. Kion nun? Mi devas promeni, ĉar mi ne havas lokon por dormo. Diskejo, sed mi nur iomete amas muzikon de diskejo. Hmm... En "normala" diskejo estas knabinoj.

Nun diskejo estas fermita. Post kvar horoj mi estos en Stokholmo. Seĝo kaj tablo. Mi sidas kaj dormas iom. Sed, se mi dormas tre longan tempon... ili ĵeti min el ŝipo, bonega. Nun mi dormas...

Bonege, mi dormis malbone, ĉirkaŭ du horojn. "Stockholm-city terminal", mi devas trovi tion.

– *Pardonon, kie kuŝas "Stockholm-city terminal"?*

– *Mi iros preskaŭ saman lokon. Sed mi lasos aŭtobuson unu bushaltejon pli frue. Kiam mi lasos aŭtobuson, post tio vi scias ke tio estas sekva bushaltejo.*

Ĉi jare mi vojaĝis en la Italio per aŭtobuso. Kaj nun, mi vojaĝas per la aŭtobuso en Svedio...

– *Nun mi lasas aŭtobuson, sed rigardu, City-terminal estas tie.*

– *Koran dankon kaj saluton.*

– *Saluton.*

City-terminal estas granda domo. Nun mi devas aĉeti bileton el Stokholmo al Karlstad. Post tio, el Karlstad al Lesjöfors.

– *Bonan tagon. Mi bezonas biletojn el Stokholmo al Karlstad kaj el Karlstad al Lesjöfors. Mi scias, ke mi devas sanĝi aŭtobuson en Karlstad, ĉar mi devas veturi al Lesjöfors.*

– *Mi vendas nur bileton el Stokholmo al Karlstad.*

– *Kial nur?*

– *Ĉar Swe-buso ne iras al Lesjöfors. El Karlstad al Lesjöfors, iras alia entrepreno de aŭtobusoj.*

– *Ĉu vi scias horarojn el Karlstad inter Lesjöfors?*

– *NE! Tute ne. Ĉar el Karlstad al Lesjöfors iras alia enterpreno de aŭtobuso! Demandu en Karlstad.*

Linda sed malafabla funkciulo. Sed nun mi havas bileton el Stokholmo al Karlstad. Tie estas pordego 38.

Suno brilas, varmega tago. Buso estas varmega kiel saŭno kaj mi havas nur duonlitron da akvo. Tri horojn poste... Bonege, mi estas en Karlstad. Kaj nun mi nur sanĝas la aŭtobuson. Sed kiom longe mi havas tempon por tio?

Jes, mi havas grandan problemon. Mi estas en Mezsvedio, kion mi faras? Ĉitie ĉiuj parolas la svedan, kelkaj parolas la anglan kaj svedan, sed mi ne komprenas la svedan. Kaj mi komprenas nur iomete la anglan.

Kiel mi iros al Lesjöfors? Mi ne scias, kiom multe da kilometroj estas, el ĉitie al tie. Tie estas ŝoforo de buso, mi demandas.

– *Pardonon sinjoro, mi havas demandon al vi.*

– *Diru bonvolu.*

– *Mi ne scias kion tempon veturos aŭtobuso el Karlstad al Lesjöfors?*

– *Ne iras. Ĉar nun estas sabato.*

– *Granda problemo. Ĉar en Lesjöfors komenciĝas unu okazo hodiaŭ. Kion mi faras nun? Mi ne scias.*

– *Rigardu, vi havas telefonon. Ĉu vi havas telefonnumeron de la okazo?*

– *Dankon, bonega ideo. Jes, mi havas numeron. Mi telefonos al la Esperantodomo.*

Kion mi diros tien, ĉar mi estas komencanto kun lingvo de Esperanto? Mia opinio nun mi bezonas mian vortaron. Mi faras pretajn frazojn antaŭ ol mi telefonos.

– *Saluton. Mi estas Timo Pirinen el Finnlando.*

– *Saluton Timo.*

– *Mi estas problemo. Mi estas nun en Karlstad kaj mi havas problemo ĉar neniu aŭtobuso iros al Lesjöfors.*

– *HO, ĉu vi bezonas veturigon?*

– *Jes, mi bezonas veturigon.*

– *Kelkaj aŭtoj iras ĉitie, Lesjöfors al stacidomo de Karlstad. Pardonon, mi forĝesis vian nomon.*

– *Timo Pirinen.*

– *Dankon. Mi rakontas tion al nia ŝoforo. Nun vi bezonas promeni al stacidomo de Karlstad. Mal-longa vojaĝo. Ĉirkaŭ 400 metrojn. Vi preskaŭ vidas tion.*

– *Jes, nun mi kredas, ke mi vidas stacidomon. Koran dankon al vi.*

– *Ne dankinde kaj bonvenon al IJK.*

– *Dankon.*

Stacidomo de Karlstad. Mi estas plu en Karlstad, negravas. Ĉar aŭto venos kaj kunportos min, al Lesjöfors. Sed kiu knabino ŝi estas? Ŝi promenas tien kaj reen... Ne, ŝi estas loka knabino. Sed se ŝi estas loka, kial ŝi havas grandan dorsosakon? Eble, ŝi estas Esperantinisto... Jes, ŝi kunportas nian flagon.

– *Saluton, mi pensas ke, vi parolas Esperanto?*

– *Saluton. Jes mi parolas iom Esperanto. Mi pensis ke, mi estas sola, ĉitie.*

– *Mi havis sama penso, en la mia kapo. Sed ne plu.*

– *Ĉu vi atendas aŭto, ĉu vi scias kion tempon tio venos?*

– *Mi ne scias. Mi telefonis post momenton al IJK kaj el tie ŝi diris ke aŭto iras nun. Sed mi ne scias ke, kiom multe da tempon ŝoforo bezonas.*

– *Do, ni atendas.*

– *Jes, ni atendas.*

Bonege, nun mi ne atendas sola. Hmm... En Italio, mi trovis ankaŭ en stacidomo knabinon, kiu parolis Esperanton. Kaj nun, en la Svedio. Mi pensas ke, tio estas mia amuza destino. Nun, "novaj" esperantistoj venas el stacidomo.

– *Saluton geamikoj!*

– *Saluton! Ĉu aŭto venos?*

– *Jes, laŭ mia scio.*

Ni babilas kune kaj atendas la aŭton. Kelkajn minutojn poste, aŭto venis. Ŝoforo de aŭto demandis ĉies nomon. Nun mi sidas en aŭto kaj sama babilo daŭras. Tio estis bona ideo telefoni al IJK. Ĉar mi havis longan vojon promeni. Aŭto veturas ĉirkaŭ okdek kilometroj per horo, tutan tempon. Kaj nun, mi sidis en la aŭto, ĉirkaŭ unu horon.

– *Ĉi tie estas Parko de Esperanto kaj bonvenon al ALKO.*

Finfine, la IJK. Kiam mi vojaĝis el Porvoo al IJF, al Italio, mi bezonis nur ĉirkaŭ kvin aŭ ses horojn da tempo. Sed, amuza afero. Ĉar mi vojaĝis el Porvoo al IJK, al Lesjöfors mi bezonis ĉirkaŭ dudek horojn. Sed ĉitie estas sama animstato kiel en IJF. Ĉiuj homoj demandas: "De kie landon vi venas?, Kiom multe da tempon via vojaĝo daŭrigis?" K.t.p. Ĉiuj estas geamikoj kune. BONEGA!!!!

P.S. Dum la IJK, mi kalkulis miajn monojn kaj pripensis ke post IJK mi vojaĝas al UK, al Gotenburgo.

Timo Pirinen

Sur la nokta ĉielo

Ruĝa brilo malalte sude

La elstara interesaĵo sur la nokta ĉielo dum tiu ĉi aŭtuno estas la planedo Marso. Speciale brila ĝi estis en fino de aŭgusto, kiam ĝi estis eksterordinare proksime la Tero. Dum aŭtuno ĝi nun iom post iom iĝas malpli brila, sed por ni norduloj ĝi samtempe leviĝas en pli videblan situon. Dum la plej proksimaj renkontiĝoj de la Tero kaj Marso, la tn. periheliaj opozicioj (*perihelioppositio*) de Marso, ĝi ĉiam estas en tiom suda parto de ĉielo, ke ĝi estas preskaŭ kaŝita de observantoj en Finnlando.

La tutan aŭtunon Marso videblos en suda direkto dum vesperoj, ekzemple 15.10. je 22 kaj 25.10. je 21 ĝi estos precize sude. Ĝis mezo de oktobro ĝi estos la plej brila objekto en la nokta ĉielo, krom la Luno. Ankaŭ pli poste ĝi estos unu de la plej brilaj kaj facile konebla, ĉar ekzistas neniuj brila stelo en la sama regiono de la ĉielo.

Rimarkiga trajto de Marso estas ĝia ruĝa koloro. Ĝi estas ne tiom plenkolora ruĝa, kiom kelkaj nuntempaj homfaritaj lumigiloj en la nokta pejzaĝo, sed la ruĝeco estas bone perceptebla tamen. Por antikvaj popoloj la koloro de Marso aludis pri sango, kaj tial ĝi reprezentis la samnoman dion de milito en Romio. Reale la ruĝa materio en la surfaco de Marso estas fera oksido (*raŭtaoksidi*), kiu estas praktike la sama, kiun oni en ĉiutaga terminaro nomas rusto (*ruoste*).

Ĉu iu vivas tie?

Dum longa tempo Marso interesis homon pro ebleco de vivo ekzistanta tie. Iam en la 19-a jarcento multaj pensis esti memklare, ke sur Marso vivas eĉ intelektaj estaĵoj, kaj planis pri diskuto kun ili per iuspeca signumado. La pruvoj pri la intelektaj marsanoj evidentiĝis malpravaj, sed estas ankoraŭ ne ĝis fino konkludita, ĉu vivo povus ekzisti. En la fina parto de la 1990-aj jaroj

la scienca mondo vigle debatis pri ŝtono, kiu venas el Marso kaj en kiu troviĝas formaĵoj, kiuj povus esti fosilioj de mikroboj (*mikrobifossileja*). La debato finiĝis nekonkluda. La formaĵoj povus esti fosilioj, sed egale bone ankaŭ spuroj de kemiaj procezoj.

Kaj nun dum lastaj du jaroj novaj esploroj montris, ke Marso estas eble ne tro seka por vivo. Pro antaŭaj esploroj oni pensis, ke atmosfero (*kaasukehä, ilmakehä*) kaj polusaj glaĉeroj (*napajäätiköt*) de Marso konsistas nur de karbona dioksido (*hiilidioksidi*), kiu ne subtenas ekziston de vivo. Nun oni trovis ankaŭ akvon en signifaj kvantoj. Nun pro la eksterordinara proksimeco estis favora okazo sendi spacoveturilojn al Marso, kaj tion spacoesploristoj utiligis. En fino de tiu ĉi jaro Marson atingas kvin esploriloj, kies rezultojn oni atendas por ankaŭ ilustru pli la eblon por ekzisto de vivo.

Rigardu Marson, sed ne pensu, ke iu rerigardus vin de tie. Vivo en Marso estas maksimume bakterioj, kiuj ne havas okulojn. Se iu sur Marso direktas observon al nia planedo, ĝi estas maksimume fotila lenso de iu spacoesplorilo, kiun homo sendis tien.

Mikko Mäkitalo

Esperanto-societo de Oulu 25-jara

Esperanto-societo de Oulu aranĝos publikan renkontiĝon pro sia 25-jariĝo. La fondo okazis la 4-an de oktobro 1978.

La jubilea kunveno okazos la 8-an de novembro en la ĉefa urba biblioteko de Oulu. Krom la membroj estas invititaj ankaŭ aliaj interesitoj. Kiel prelegantoj ĉeestos Osmo Buller kaj Jukka Pietiläinen.

Muut lehdet

Rauman syyspäivät lehdissä

EAF:n Rauman syyspäivät olivat uutisia Satakunnan alueen lehdissä. Länsi-Suomi kirjoitti syyspäivistä kaksi kertaa, 10.9. ja 13.9.2003 ja Satakunnan kansa kirjoitti 13.9.

Länsi-Suomen ensimmäisessä artikkelissa esiteltiin syyspäivien tapahtumat ja luennoitsijana paikalle saapunut Euroopan Esperanto-unionin Brysselin tiedotuskeskuksen edustaja Dafydd ap Fergus. Jutussa esiteltiin myös EAF:n *Al kvalita komunika-do* -projekti ja sen päämäärät sekä muistettiin esperantistien Rauman manifesti, jonka nuorisokongressi julkaisi 1980 kokouksessaan Raumalla.

Viikonlopun (13.9.2003) Länsi-Suomi-lehdessä jutun pääpaino oli Dafydd ap Fergusin haastattelussa. Hän puhui englannin asemasta maailmankielenä ja siitä johtuvasta brittien ja amerikkalaisten saamasta kielellisestä etuasemasta. Esperanto sopisi paremmin yleismaailmalliseksi kieleksi, vaikka sen käyttöönotto vie käytännössä useita vuosikymmeniä. Länsi-Suomen kummassakin jutussa esiteltiin Esperanto-unionin tiedotuskeskuksen toimintaa. Jälkimmäisen artikkelin yhteydessä oli tietolaatikkoon koottu tietoa esperantistien määrästä, kielen lyhyt esittely ja joitakin vuosilukuja esperantoliikkeen historiasta, mm. Suomen maailmankongressien järjestämisvuodet 1922, 1969 ja 1995.

Satakunnan kansassa esiteltiin myös Laatusviestintään -projekti, Dafydd ap Fergus sekä hänen toimintansa Euroopan Esperanto-Unionissa ja hänen käsityksensä esperanton mahdollisuuksista käyttökielenä. Hän esit-

teli lyhyesti esperanton taustan ja historian.

Anna Ritamäki EAF:n puheenjohtajana esitteli Suomen Esperantoliiton toimintaa, esperanton asemaa nyky maailmassa ja esperantistien määrää. Hän arvioi, että esperanto on syvällisempi kieli kuin englanti.

Raumalainen Tuomo Grundström kertoi omasta esperantoharrastuksestaan, joka alkoi 1960-luvulla. Jutussa mainittiin myös esperanton Rauman manifesti. Zamenhofin toiminta kielen keksijänä esiteltiin, sekä kerrottiin, että sekä Hitler että Stalin vastustivat esperanton käyttöä.

Esperanton puutarha

Turun Sanomien Ajassa-palstalla 21.5.2003 esiteltiin Turun Esperanto-yhdistyksen toimintaa ja esperantoa otsikolla ”Esperanto on puutarha, jossa ei ole rikkaruohoja”. Lehti haastatteli Anna-Liisa Ali-Simolaa ja Jorma Ahomäkeä, jotka olivat harrastaneet kieltä vuosikymmeniä.

Turun Esperantoyhdistyksestä kerrottiin sen perustaminen lähes sata vuotta sitten ja yhdistyksen nykytila, kun jäsenistö vähitellen ikääntyy. Kieltä pääsee kuitenkin opiskelemaan kansanopistossa ja Valamon kesäkursseilla. Jutun lopussa mainitaan muutamia esperantoksi käännettyjä kirjoja, Kalevala, Seitsemän veljestä, sekä Edith Södergranin runokokoelma ”Maa jota ei ole” (Lando malekzista). Samassa yhteydessä oli tietopalsta esperantosta, sen synnystä, kehittämisestä tänä päivänä ja kielen rakentumisesta länsieurooppalaisille kielille ja että esperantisteja löytyy noin 120 maasta.

Greno, faruno kaj panoj

Viljat, jauhot ja leivät

Kia greno, tia pano^Z. La tradicia pano en okcidenta Finnlando estas ronda, maldika sekalopano kun truo en la mezo (reikäleipä). Ĝi estas malhelbruna kaj acideta. Oni tranĉas ĝin en triangulojn, kiujn oni fendas kaj ŝmiras per butero/margarino. Antaŭe oni surstangigis (stango=varras) la truopanojn por pendigi ilin ĉe la plafono. Krome, la truo rapidigas la bakadon, la mezo de la pano same rapide bakiĝas kiel la randoj.

La pasto (taikina) fermenta (käy, happanee) en tino 1-3 tagojn antaŭ la bakado. Ĝi ne nepre bezonas giston (hiiva), se oni havas gist-aĵon (taikinanjuuri). Finnoj plej ofte uzas freŝan giston, malpli ofte gistopulvoron (kuivahiiva). [Por kukoj kaj kuketoj (pikkuleivät) oni uzas bakpulvoron aŭ baksodon, ki estas natria bikarbonato.] La ori-

enta tipo de sekala pano estas sentrua, dika kaj ronda. Ĉiaj panoj estas vendataj tra la lando, sed daŭre restas lokaj specialaĵoj. En norda Finnlando specialaĵo estas tre maldika sengista hordea pano (ohraleipä), kvazaŭ dikega krespo (lettu) sen graso. Alia specialaĵo, en orienta Finnlando, estas dikega ronda pano el hordeo. Por ĝi oni uzas ne nur farunon sed grajnerojn (karkeaksi jauhettuja jyviä). Konfuze, ambaŭ tiuj ĉi specialaĵoj

nomiĝas "rieska". Troveblas eĉ pliaj regionaj specioj de "rieska".

Tritika pano (vehnäleipä) pli kaj pli ofte anstataŭas la tradiciajn finnajn panojn, sed ĝi ne tute similas al alilandaj tritikaj panoj. Ĝi ne egalas la francan panon, kaj la franca "sekala" pano tute ne egalas nian sekalpanon. Nia sekalpano pli similas al la rusa pano. Finnoj ŝatas ankaŭ miksi plurajn speciojn da

faruno en unu knedaĵon (vaivatava, paksu taikina). Aĉeteblas 4-grena pano, kiu enhavas hordeon, avenon (kaura), tritikon kaj sekalon.

Greno estas uzata ankaŭ por kaĉo (puuro). Tiam oni boligas aŭ farunon aŭ flokojn (hiutaleita) aŭ griojn (ryynejä) en akvo, lakto aŭ berosuko kaj manĝas la densan boligaĵon kun lakto, maldensa berosupo aŭ fruktosupo (kiisseli). Por la densigado de tiaj supoj oni uzas fekulon (perunajauho). Rizokaĉo kun sukero kaj cinamo estas festoplado, precipe en la julaj festoj.

Aliaj landoj, aliaj moroj. En varm[eg]a klimato oni kultivas maizon, rizon, mileon (hirssi) kaj sorgon (durra). Ili ĉiuj povas esti nomataj cerealoj. Ankaŭ fagopiro (tattari) estas cerealo, kaj kelkaj nomas eĉ pizojn kaj sojon cerealoj, ĉar ili povas esti muelitaj kaj uzataj kiel faruno. Vorto por "murot" en Esperanto estas cerealaĵo. En Eŭropo faruno kompreneble signifas tritikan farunon, sed



^Z *zamenhofa proverbo*

se temas pri aliaj grenospecioj, ni devas specifi (määrítettellä), çu hordea, sekala, avena aŭ aliaj farunoj. Bonvolu rimarki, ke la vorto faruno havas la finaĵon de la pluralo nur kiam oni parolas pri diversaj farunospecioj. Kutime vi uzu la vorton faruno sen j. Vi diru ekzemple: mi aĉetis kilogramon da faruno; por la kuko mi bezonas 3 decilitrojn aŭ 250 gramojn da faruno.


Jam longas mia babilado kaj mi ne kuraĝas daŭrigi ĝin per aliaj bakitaĵoj. Pli bone ke mi regalu min (kestitsen) per trançaĵo el fina sekalpano. Ĝi estas salubra (terveellistä). Bonan sanan apetiton ankaŭ al vi!

mord|em|e kaj modest|e
Saliko

PS. Ne kredu falsajn amikojn! Iam franco en Finnlando bezonis farunon por faruni siajn fiŝetojn antaŭ la fritado. En la vendejo li vidis saketon kun la vorto “Fariini”. Des pli danĝere, çar faruno en la franca estas “fari-

ne”. Tion li aĉetis, sen cerbumi pri la vosto de la vorto. Nur malferminte la saketon li komprenis, ke li aĉetis sukeron.

”Fariinisokeri” = bruna sukero.



En la Gotenburga UK, de maldekstre: Askto Kyttä, Timo Pirinen, Jorma Toropainen kaj Pentti Makkonen. (Foto: Päivi Saarinen)

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon: Ilkka Santtila, Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki, s-posti ilkka.santtila@esperanto.fi mieluummin kirjallisena.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ◆ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.
☎ Sakari Kauppinen, sakari@skau.pp.fi
- ◆ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispohantie 298, 74100 Iisalmi
- ◆ Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen), Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609
☎ kari.kettunen@pp1.inet.fi
- ◆ Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti.
☎ martti.pennanen@pp.phnet.fi
- ◆ Mikkelin Esperantokerho / Esperantoklubo de Mikkelä, (Elli Husso) Porrassalmekatu 27 B 51, 50100 Mikkelä.
- ◆ Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu
- ◆ Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla
☎ matti.wallius@pp.inet.fi
- ◆ Esperantoseura Antaüen ry. / Esperantosocieto Antaüen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Lauri Liukkonen, Varstie 37, 37500 Lempäälä, ☎ lauliu@sci.fi)
- ◆ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ tiina.oittinen@pp.inet.fi
- ◆ Suomen opettajien esperantoliitto / Esperanto-Ligo de Finlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 800015-129185
- ◆ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarekatu 15 C 65, 00530 Helsinki.
☎ fejo@esperanto.fi. Tilinro: 101130-227446
- ◆ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki.
☎ (09) 660 651

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmak-

sut liittoon. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu v. 2003 on 18 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Mietinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2003**
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
6	1.11	15.11	1.12

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

Ilmoitushinnat ◆ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 e	1/1 sivu/paĝo 50 e
1/2 sivua/paĝo 60 e	1/2 sivua/paĝo 30 e
1/4 sivua/paĝo 40 e	1/4 sivua/paĝo 20 e

Palautusosoite: Esperantoliitto
Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki



Esperantolehden yhteyskortti

Lahjatilaus _ / __ alkaen.

Lahjatilauksen saajan nimi ja osoite:

(Lahjatilauksen maksajan nimi ja os. kortin alaosaan)

Tilaukseni päättyy _ / __.

(Osoitetarra kortin alaosaan)

Osoitteeni muuttuu _ / __ alkaen.

(Osoitetarra kortin alaosaan)

Uusi osoitteeni on:

Kestotilaus _ / __ alkaen.

Tilaus _ / __ alkaen.

Tilaaajan, kestotilaaajan tai lahjatilauksen maksajan nimi ja osoite. Osoitetarran paikka:

**Posti-
merkki**

**Suomen
esperantoliitto ry.**

**Siltasaarenkatu 15 C 65
00530 Helsinki**

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy joulukuun alussa. Jutut 15.11.2003 mennessä EAF:n toimistoon. Venonta numero aperos en la komenco de decembro. Artikoloj ĝis 15.11.2003 al la oficejo de EAF. Osoite/adreso: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, puh/tel. (09) 715 538, s-posti/rete: <eaflehti@esperanto.fi>.